

# esperanto sub \_\_\_\_\_ LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

julio-aŭgusto 2007 • numero 88 | volumo 15 - numero 4



Antaŭ 120 jaroj: aperis la unua libro pri Esperanto (26 julio 1887)

ISSN 1039-9380

esperanto sub

# LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIIO

N<sup>o</sup> 88 • Vol 15.4 • Julio-aŭgusto 2007

**Redaktoro:** Donald Broadribb

## Eldonado:

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per komputilo iMac; la programo uzita estas Mellel; la ĉeftiparo estas New Century Schoolbook.

## Abonoj kaj membreco:

AŭD\$40 (AŭD\$25 por pensiuloj kaj aranĝitoj). Por membroj, ekstraj ekzempleroj de *Esperanto sub la suda kruco* kostas AŭD\$3.00 + poŝtendokosto.

Pagu al Libroservo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio.

[libroservo@esperanto.org.au](mailto:libroservo@esperanto.org.au)

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas ĉe:

<http://www.esperanto.org.au/>

*Esperanto sub La Suda Kruco* estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

## *Esperanto Sub La Suda Kruco*

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎(08)96411937

[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

Enhavo © 2007, AEA & NZEA kaj la individuaj verkintoj.

## En Ĉi Tiu Numero

La 7a Himalaja renkontiĝo & Instrui en Itahari (Franciska Toubale).....	3
Recenzo: <i>A Handbook of Volapük</i> (Jim Henry).....	6
Recenzo: <i>Samideanoj</i> (ĉ).....	9
Notice from the AEA Secretary.....	9
Nov-Zelando promesas varman kongreson (David Ryan).....	10
Petoj.....	12
Negrandaj informoj atentindaj Literatura konkurso internacia DVD-filmo voĉigita en Esperanto.....	13
Nova DVD <i>Esperanto elektro- nike</i> .....	14
“The Mailbox Is Full”.....	15
Interrete.....	16
Hejmulo Kabulo (Kam Lee).....	17
El la regionoj Adelajdo.....	18
NSW.....	19
Esperanto-Federacio de Viktorio.....	20
Melburna Kafo-Klubo.....	21
Skoltado centjara.....	22
La jaro de la Hundo (Andrew Soos).....	23
Vinilkosmo-novaĵoj.....	24
For the Beginner (ĉ).....	27
Ĉinio.....	30

## Atentu!

### *Ŝanĝo de limdato*

La limdato por *ESK* septembro-oktobro estas la **5a de julio**.

## La 7a Himalaja Renkontiĝo de Franciska Toubale

De la 26a de februaro ĝis la 11a de marto 2007, dek du japanoj, tri germanoj, kaj mi, la nura aŭstraliano, renkontiĝis kune kun dudeko da nepalaj esperantistoj por malkovri parton de Himalajo.

La du unuaj tagoj estis dediĉitaj al vizito al la plej famaj temploj aŭ malnovaj urboj, kiel Paŝupati, kie loĝas multaj pitoreskaj joganoj kaj kie la korpo de la hinduismanaj mortintoj estas bruligita apud la rivero, aŭ Bhaktapur, kies mallarĝaj stratoj bedaŭrinde perdis sian trankvilecon ekde kiam la veturiloj de la komercistoj ilin ekinvadis.

La vizito al Patano, la dua plej granda urbo de la valo Kathmandu, ne povis okazi pro striko. Nuntempe la minoritatoj de la lando manifestacias por akiri la rajtojn, kiuj estis rifuzitaj al ili, kaj organizas surprizajn strikojn, kies daŭro neniam estas antaŭe konata. Tiam la aŭtomobiloj kaj busoj ne iras, la vendejoj estas fermitaj. Ne plu estas konstanta hupado, do estas pli agrable promeni surstrate, sed oni devas atenti pri la ŝtonoj ĵetitaj al la neobeemuloj.

**La vilaĝanoj bonvenigas nin**  
La koro de la renkontiĝo estis la piedirado en la montaro. Ni atin-

gis la deirpunkton, Sjaprubesi, 2120 metrojn altan, ĉirkaŭ 100 km norde de Kathmandu post tuttaga skuado en buso laŭlonge de la vojo, kiu serpentas laŭ la montaro. De tie ni rondiris dum kvin tagoj en la lando de la popolo Tamang, admirante la neĝkovritajn pintojn de la montaro Langtang, kies plej alta pinto superas 7000 metrojn.



Ni unue haltis en Gatlang, kies loĝantoj amasiĝis en la korto de la komunuma domo, kie ni tranoktis, kaj bonvenigis nin per dancoj. La sekva tranoktado estis en Tatopani, kiu en la Nepala lingvo signifas “varma akvo”. Fakte tie troviĝas fontoj de varma akvo. Ĉu ekzistas pli efika maniero forgesi la spir- kaj fortomankon pro la kruteco de la

vojo ol sin bani en tiuj basenoj, rigardante la sunsubiron malantaŭ la montaro? La plej kuragaĵ ellitiĝis je la 3a en la nokto por rigardi luneklipson.



Survoje al Thuman ni atingis la plej altan punkton de la piedmigrado, iom pli ol 3000 metrojn. Dum la cetero de la piedmigrado ni iom post iom malsupreniris longe de la rivero Bhotekoshi Nadi. La plano estis iom ŝanĝita pro timo ke la malarapiduloj ne kapablos elteni tro longan etapon. Nia lasta kontakto kun la Himalajo estis en Daman, 3210 metrojn alta feriloko,

de kie eblas vidi sen iu ĝeno la sunleviĝon sur la tuta Himalajo, inkluzive sur monto Everest. Mi aparte ŝatis tiun piedmigradon pro tio ke ĝi donis al mi la oportunon iom dividi la vivon de la popolo Tamang, kiu, pro manko de hotelo, gastigis nin. Dum la tago mi povis vidi la virojn diligente plugi la grundon kun la helpo de bovo, aŭ la ĝeknaboj porti korbajn da sterko al la kampoj; kaj dum la vespero, estis agrable sidi kaj babili apud la fajro.

La ideo de la Himalaja Renkontiĝo estas doni la oportunon praktiki Esperanton kun la nepalanoj, kiuj malfacile povas vojaĝi eksterlanden. Ili estas ĉefe tre entuziasmaj ĝejnuloj. Babili, ŝerci kaj kanti kun ili, certe mallongigas la vojon. Tiu renkontiĝo okazas ĉiun duan jaron. Espereble la sekva renkontiĝo estos en la orienta parto de la lando. Venu kaj spertu tiun piedmigradon. □

.....

## Instrui en Itahari

### de Franciska Toubale

Itahari estas la tria pli granda urbo de Nepalo, kiu situas en la orienta parto de la lando, 30 km for de la landlimo kun Hindio.

Dum mia unua vojaĝo al Nepalo, mi renkontis kelkajn esperantistojn de ONES, la Esperan-

toasocio de tiu orienta parto. Mi jam konsciis, ke ili devas strebi vojaĝi al Kathmandu por praktiki la lingvon, ĉar malmultaj el ili kapablas konversacii en Esperanto. La regiono mem estas tute ebena, sed necesas dek

horoj, aŭ pli, en buso por traveturi la 500 kilometrojn longan vojon, kiu serpentumas en la montaro inter la du urboj. Do kun la helpo de Santosh Karki, juna sperta esperantisto, mi decidis iri al ili kaj restis tie dum dek tagoj

Pro striko, mi ne povis realigi mian planon malkovri kiel eble plej de la lando kaj finfine flugis al Itahari kune kun Hori Jasuo, la prezidanto de KAEM (Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado), kiu forte subtenas la iniciatojn de la asocio ONES. Ni tamen havis belan vidon je la Himalaja Montaro en la matena suno el la fenestro de la malgranda aviadilo.

Dank' al la elturniĝemo de la lokaj esperantistoj, atendis nin je la flughaveno de Biratnagar rikiŝoj, per kiuj ni atingis la celitan lokon, Itahari, 20 km for de Biratnagar.

Tie ni estas en agrikultura regiono, kun tropika klimato. Ambaŭflanke de la vojo staras ankaŭ fabrikoj de sapo aŭ nutr-aĵoj.

Antaŭ la komenco de la kursoj, estis organizitaj kunvenoj en diversaj lokoj por allogi lernantojn al Esperanto: —en la korto de iu domo, kie la loĝantoj de la strato Zamenhof (laŭ la nomo donita de Hori), aparte infanoj, venis antaŭ ol iri al lernejo kaj tuj kaptis la vortojn de niaj kantoj en iu lernejo, kie esperantisto

instruas; —en la urbodomo, kie gravuloj de la urbo venis por montri sian subtenon.

Poste ni daŭrigis la diskonigon de Esperanto en apudaj urboj kiel Tahrara kaj Dahran.

Pro tio ke la angla lingvo estas uzata ekde la baza lernejo por instrui studtemojn krom la nepala lingvo, kelkaj ne komprenas la utilecon de Esperanto. Sed kulture grupo de ĉirkaŭ kvin volontuloj entuziasme deziras tuj lerni.

Rudra, kiu posedas unu el tiuj multnombraj institutoj, kie la gejunuloj sekvas pliajn kursojn por garantii al si sukceson, disponigis ĉambron por la instruado de Esperanto.

Je la komenco la rekta metodo iom konfuzis kaj timigis ilin, sed rapide la bonhumoro (ĉu kreita de la proponitaj ludoj?) kaj la entuziasmo venkis.

Sepdekjarulo deziris esperantistiĝi, do mi renkontis lin ĉiun tagon post la tagmanĝo kaj instruis lin en angulo de la oficejo de Rudra, malgraŭ la konstanta eniro kaj eliro de la studentoj, kiuj scivoleme iom sidis por aŭskulti. Finfine kvar gejunuloj aldoniĝis.

Dank' al la sistemo laŭ kiu ĉiun tagon mi devis tranokti kun nova familio, mi povis bone sperti kia estas la vivo en tiu parto de la mondo. Ĝi certe estas pli komunuma ol en Okcidento. Aparte, sed tamen en la sama

domo, loĝas pluraj generacioj. Ankaŭ la najbaroj venas saluti vizitanton, kaj montras intereson per amaso da demandoj.

Mi esperas, ke eĉ post mia foriro, malgraŭ la foresto de la plej spertaj kiel Cholnat, Sree au

Santosh, malgraŭ ilia izoleco, la esperantistoj de Itahari daŭrigos la lernadon de la lingvo kun la sama entuziasmo kaj diligenteo. Mi certas ke mi lasis tie multajn geamikojn. □



## • Recenzas Jim Henry

Andrew Drummond: *A Handbook Of Volapük and an Elementary Manual of its Grammar and Vocabulary, prepared from the Gathered Papers of Gemmell Hunter Ibidem Justice; together with an Account of Events Relating to the Annual General Meeting of 1891 of the Edinburgh Society for the Propagation of a Universal Language.* Edinburgh: Polygon, 2006. 320pp, paperback.

In 1891 Volapük was twelve years old; there had already been three international conventions, the third of which used Volapük exclusively.


It seemed to have a huge head start over any other constructed international language that might come along, with its thousands of speakers and hundreds of books and periodicals.

But Esperanto, just four years after Zamenhof's first publication, was acquiring new speakers at a surprising rate, many of them former propon-

ents of Volapük.

Solresol, the musical language, still had a few adherents here and there, and dozens of other short-lived proposals for a universal or international language were being published and promoted for a short time.

Which, if any, of these languages would prevail?



Andrew Drummond's second novel is set during this suspenseful and exciting time for

the international language movement, and focuses on the Edinburgh Society for the Propagation of a Universal Language: more particularly on two of its most influential members, Gemmell Hunter Ibidem Justice, travelling church-organ repairman and Volapük teacher, and his former comrade, now bitter enemy, Dr. Henry Bosman, physician and Esperantist.

The rank and file of the Society have many of them their own preferences — for Solresol or Nal Bino, for Leibnitz's system of prime numbers, for a revival of Latin, Greek or Hebrew, or the simple promotion of English; but the real contest is between Mr. Justice and Dr. Bosman, as to whether the Society at its next annual meeting will definitively endorse Volapük or Esperanto.

The story is told primarily (except for a preface by a Dr. Charles Cordiner, phrenologist, who explains how he found the following papers and arranged for their publication) from the hilariously biased and unreliable viewpoint of Mr. Justice.

We first meet him as he is travelling through the northeast of Scotland, repairing church organs.

One night as he leaves a church in Cromarty after a long day's repair work, he meets a mysterious old man, Sir Tho-

mas, in the church graveyard; a man who, though he has never heard of Volapük, is no stranger to universal languages.

Mr. Justice and Sir Thomas agree to travel together and assist one another, on terms which Mr. Justice is not inclined to explain to the reader.

Sir Thomas proves a persuasive and powerful teacher's assistant as Mr. Justice endeavors to teach the rudiments of Volapük to the Self-Betterment League of Peterhead, the Didactic Society of Newburgh Linoleum Workers, the Workers Improvement Association in Dysart, and other such local societies.

But in spite of his enthusiasm and talent for Volapük, Sir Thomas has invented a universal language of his own, and steadily maintains its superiority.

Who or what is Sir Thomas?

What was he doing in the Cromarty graveyard?

Can we credit his claim to be an old schoolfellow of George Dalgarno?

All these questions are eventually answered for the reader who hasn't figured out the answers on his own.

But what about the cloak, scimitar and helmet that Sir Thomas loans to Mr. Justice for use in inducing difficult pupils to apply themselves more assid-

uously to the study of Volapük, or to persuade wavering members of the Society to support Volapük rather than Esperanto?

Each time Mr. Justice dons the helmet, it affects his view of the world more strangely than before.

Can Mr. Justice trust Sir Thomas?

Can the reader trust Mr. Justice?

(Apparently not, although he lets slip some clues to things he is unwilling to speak about directly.)

The title may lead some booksellers to shelve the book as a language textbook rather than a historical fantasy novel; in fact this would not be entirely wrong, as the novel contains nineteen lessons in Volapük, mainly adapted from Charles E. Sprague's 1888 primer (also titled *Hand-book of Volapük*; see <http://personal.southern.edu/~caviness/Volapuk/HBoV/hbv.htm>).

The lessons (most if not all of them) are integrated smoothly into the narrative, as Mr. Justice teaches his pupils and travelling companions about the language; many of the example sentences and exercises for translation are adapted to be relevant to the situation in the novel at a given point, and are generally as funny as the rest of the story; which is to say, very funny in-

deed.

Drummond is not quite on a level with P.G. Wodehouse or Terry Pratchett in his ability to keep you laughing, but he comes pretty close at times.

The novel touches on other issues of language politics — sexism in language, for instance, in an amusing three-way debate between Mr. Justice, Dr. Bosman, and their landlady's daughter; or nationalistic suppression of minority languages like Gaelic, and whether a common language would make this even worse; i.e., whether a universal language, or an international language, is what is really wanted.

Besides all this, there is a contest to train two parrots in Esperanto and Volapük, the Decennial Census and a number of fraudulent census forms, a dirigible, and a mechanical translation engine. What more could you ask for?

A *Hand-book Of Volapük* may not be available in bookstores outside the UK, but it's readily available through [www.amazon.co.uk](http://www.amazon.co.uk) and from a few online booksellers in other countries.

*[Mi legis ĉi tiun romanon kaj trovis ĝin tre distra. Facila legaĵo ĝi ne estas — ĉar ĝia aŭtoro humuroplene provas vin trompi tra la tuta libro. — [d]]* □





## • Recenzas via redaktoro

**Red. Aleksander Korĵenkov:**  
*Samideanoj — Satiroj kaj humuraĵoj pri Esperanto kaj pri esperantistoj.* Kaliningrado: Sezonoj, 2006. 80p.

Takso: 🍷🍷🍷

Ĉi tiu libro konsistas el 27 nelongaj noveloj por finintoj de kurso de komencantoj, t.e. por “progresantoj”. Ili estas interesaj, plejparte instigas ridon, ĉu leĝeran, ĉu fortan, uzas ordinarajn vortojn, kaj ordinaran norman Esperanton. Ili ne estas speciale “faciligitaj” por komencantoj; ĉiu el ili antaŭe aperis en gazeto aŭ novelaro de konata aŭ-

toro esperantista.

La noveloj eble plej taŭgas por “progresigaj” kursoj, anstataŭ sola legado, ĉar pluraj el ili mencias personojn aŭ eventojn el la historio de Esperanto, kiujn relative novaj esperantistoj verŝajne ne rekonas. Do iu referencpersono havindas. Tamen, tio ne signifas ke sola leganto trovus la libron perpleksiga. Nur ke kelkaj el la menciaĵoj estus nekonataj.

Mi mem multe ridis, dum mi legis; mi suspektas ke ankaŭ vi emos same reagi. □

## Notice from the AEA Secretary:

As part of the updating of the database we have swapped to a different system for sending out copies of *ESK*. Please advise me if there are any inaccuracies or any further updates to be made.

As AEA members will know, on the AEA membership form is a section that says “skype name”. I have had several enquiries relating to this as people are curious to learn more. Skype is a way of contacting people around the world using the internet. There are usually millions of people at any one time who have the program downloaded and open on their computers and there are usually

Esperanto speakers listed amongst them. Using skype, people can talk to each other in a similar way to using the phone, and often with comparable quality. You can find more info from [www.skype.com](http://www.skype.com).

Did you know that you can subscribe to *ESK* without being a member of AEA or NZEA? The great news is that you can! Subscriptions to *ESK* cost \$50 per year, please contact <libroservo@esperanto.org.au> for more information.

And any AEA members wishing to receive *ESK* in PDF format via email (as some members already are) are encouraged to

10 | **esperanto sub la suda kruco**

do so by advising me.

Please feel free to contact me at <sekretario@esperanto.org.au> about any AEA or AEA membership related matter.

## **ANONCO PRI LA ĜENERALA JARKUNVENO DE AEA**

La venonta ĝenerala jarkunveno okazos: Sabaton la 6an kaj dimanĉon la 7an de Oktobro 2007.

Ĉe Brisbano



## **Radio 3ZZZ**

### **Nia aŭstralia Esperanto-programo ĉiusemajna**

Jam de multaj jaroj Radio 3ZZZ en Melburno ĉiusemajne dissendas unuhoran programon en Esperanto, nun aŭskulteban per interreto tra la tuta mondo. La programo disaŭdiĝas en la lunda posttagmezo, kaj restas aŭskultebla je ĉiu tempo, tutsemajne. Trovu ĝin ĉe [www.3zzz.com.au](http://www.3zzz.com.au).

La programoj de 3zzz estas arkivigataj en la retejo: [www.melburno.org.au](http://www.melburno.org.au) ekde aprilo 2004, kaj ankaŭ ĉiutempe aŭskulteblaj perrete.

## **Nov-Zelando promesas varman kongreson de David Ryan**

En Meksiko, oni kutime diras ke, se pluvas en Akapulko (varma feria loko ĉe la Pacifika marbordo), turistoj ne devos pagi sian hotelĉambron. En Nov-Zelando, ni faras preskaŭ la saman promeson: ni ne redonos al vi vian monon, sed ni certe promesas varm-someran kaj interesan kongreson en Aŭklando.

### **Datoj**

La Oceania Kongreso komenciĝos la 14-an de januaro 2008. Se vi volas mendi flugon al Aŭklando, indas scii ke la solena

malfermo komenciĝos je la 1.30 pm. Tial, se vi volas, vi povos alveni la matenon de la 14-a.

La kongreso daŭros naŭ tagojn ĝis la 23-a de januaro (la solena fermo okazos je la 1.30pm).

### **Kongresejo**

La kongresejo estos St Francis Retreat Centre kiu situas inter la flughaveno kaj la urbocentro (proksimume je 10 minutoj aŭtomobile de la flughaveno kaj 15 minutoj de la urbocentro).

Pro la fakto ke la kongresejo estas eksa monaĥejo, estas

dormoĉambroj kun nur unu lito (nur por unu persono). Tamen, se vi preferas, eblas mendi plurpersonan ĉambron ĉe apudaj hoteloj (NZEA povos helpi pri la mendado de hotelĉambroj).

### **Programo**

Dum la kongreso ni ofertas kursojn je tri niveloj:

*komencantoj* (instruos Katja Steele)

*meznivelanoj* (instruos Stano Marček el Slovakio, redaktoro de *Esperanto*)

*progresintoj* (instruos Trevor Steele)

Kursoj okazos dum sep el la naŭ tagoj de la kongreso. Krom kursoj, dum la kongreso okazos unu tuttaga ekskurso al kampara regiono kaj regiona parko apud Aŭklando kaj du duontagaj ekskursoj al montaro apud Aŭklando kaj al tradicia maoria domo kun tipa maoria manĝo (tre bongusta!). Ankaŭ okazos distraj vesperoj, debatoj, bankedo, teatraĵoj ktp.

### **Kotizoj**

Ĉi-momente, la kongresa kotizo ne estas tute fine decidita. Tamen, jen provizoraj kotizoj en

AU\$ laŭ la fruĵunia kurzo:  
ĉeesto, loĝado kaj ĉiuj manĝoj dum naŭ noktoj: \$720

po-taga ĉeesto, loĝado kaj ĉiuj manĝoj: \$90

po-taga ĉeesto kun ĉiuj manĝoj: \$55

Atentu ke tiuj prezoj estas nur provizoraj kaj dependas de la dolara kurzo, sed ni ne atendas grandan ŝanĝon.

### **Aliĝiloj**

Ni esperas kunsendi aliĝilojn kun la septembro-oktobra numero de *ESK*. Tamen, ni metos ĝin en PDF-formato sur nian retpaĝon ([www.esperanto.org.nz](http://www.esperanto.org.nz)) tuj kiam ĝi estos preta (plej verŝajne en julio).

Ni intencas vaste propagandi pri la Oceania Kongreso por allogi samideanojn el la tuta mondo. Tial, ni atendas vere internacian etoson. Plie, ni ĝojas pro la fakto ke altkvalitaj kaj lertaj Esperantistoj instruos dum la kongreso.

Ni atendas vin, niajn karajn aŭstraliajn gekuzojn. Venu por koni la plej grandan kaj kulture diversan urbon de via orienta najbara lando. □

## **Korekto**

Ni erare informis, sur la kovrilpaĝo de *ESK* majo-junio 2007, ke la unua ĉeffilmo tute en Esperanto estis *Incubus* (1965). Efektive, jam en 1964 aperis la dramfilmo *Angoroj*, 61-minuta filmo.

## Petoj

Mi scias, ke estas esperantistoj kiuj havas multajn okupojn, sed, ili tamen povas helpi nepagipovajn landojn sendante eĉ malnovajn librojn, revuojn, kc.

Ĉu iu ne bonvolus liberigi siajn tirkestojn kaj bretarojn? Aĵoj sensignifaj por vi estas tre arde serĉataj de afrikaj esperantistoj.

Bonvolu helpi!

Sro Monshet Nhy Wa Dana

CILU

B.P. 7598

boulevard et building du 30 juin

Kinshasa

Demokratia Respubliko Kongo

<monshetnhywadana@yahoo.fr>

Karaj gesamideanoj!

Mi estas delegito de UEA en Ĉinio kaj mi estas aktiva esperantisto. Nun mi planas unuigi la esperantistojn, kiuj interesiĝas pri fotado kaj fondi Internacian Esperantistan Foto-Asocion.

Ĉu vi povas helpi min dissendi mian proponon al esperantistoj?

Antaŭdankon!

Sun Mingĝiao

Retadreso: <semio@163.com>



## • Negrandaj informoj atentindaj Literatura konkurso internacia

*La Ondo de Esperanto* denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso Liro.

Liro-2007 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduka poezio: Poemoj de Saša Ĉjornyj (Aleksandr Glikberg), okaze de lia 75a mortodato
4. Traduka prozo (el la rusa lingvo): Аптекаша de Anton Ĉeĥov
5. Traduka prozo (el la angla): “Eveline” de James Joyce (el novelaro *Dubliners*)

En la branĉoj 1–3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzem-

plerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, abon. jaščik 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 15a de oktobro 2007.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. **Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete**, en apartaj mesaĝoj, al la adreso <sezonoj@yahoo.com>. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondopono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe:

<http://Esperanto.org/Ondo/Liro2007.htm>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2007. La organizanto ĝis la 1a de januaro 2010 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Legu pli pri Liro: <http://Esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>

## DVD-filmo kun voĉigita traduko al Esperanto

Estas preta kaj mendebla DVD kun klasika sovetia filmo, kiu en esperanta traduko nomiĝas *Ŝtelado de fianĉino aŭ Kaŭkaziaj aventuroj de Ŝurik*. La filmo aperis en 1966, ĝi estas unu el la plej popularaj sovetiaj komedioj.

La DVD enhavas tri sonvoĉetojn: en Esperanto — dukanala sono, Eperanto — seskanala sono, la originala seskanala. Estas aldonitaj Eperantaj subtitoloj (→ ekrantekstoj — ndlr). La Eperanta voĉa traduko estas sinkrona (la originalaj dialogoj aŭdeblas, sed estas mallaŭtig-

itaj), plenumitaj per du voĉoj (mi sonigis ĉiujn virajn, mia edzino Nataŝa — ĉiujn inajn).

Estas faritaj ankaŭ dinamikaj menuoj kaj bela grafika aspekto (disko kaj la skatolkovrilo).

La prezo rusa estas 12 eŭroj.

Iom el la priskribo de la intrigo de la filmo:

“Studento Ŝurik venas al iu montara regiono de Sovetunio por etnografiaj studoj. Li devas kolekti malnovajn fabelojn, registri tradiciojn, ritojn, eĉ... tostojn — la montarajn tostoj

estas renome belaj kaj poeziecaj. Li renkontas tie junulinon Nina, ankaŭ studentinon. Lia revo estas mem partopreni en iu rito — por sperti ĝin deinterne. Tial li tre ekĝojas, kiam konato invitas lin partopreni en vera antikva

tradicio! Kvankam strangas la afero: ŝtelado de fianĉino. Des pli, ke necesas ŝteli Ninan, en kiun li jam sukcesis enamiĝi... “

La DVD-filmo estas en la formato PAL. Daŭro: 117 minutoj. □

## Nova DVD: *Esperanto Elektronike*

Aperis la dua eldono de la sukcesa disko kun pli ol 5 Gb da materialo pri kaj en Esperanto. Sur ĝi troveblas pli ol 80 kantoj en Esperanto, pli ol 100 libroj, preskaŭ 50 mil artikoloj de esperanta Vikipedio, vortaroj, kursoj, Esperanto-revuoj, komputilaj ludoj, programoj, filmo pri Esperanto... Laŭ la eldonisto nur sur la Aŭstralia kontinento neniu interesiĝis pri la eldonaĵo. Mi mendis kelkajn ekzemplerojn de la DVD kaj pretas vendi ilin po \$6 aŭstraliaj (inkluzive de sendokostoj).

*Atentigo:* por povi uzi la DVD-n, via komputilo devas havi CD-ROM-ludilon.

K. Steele, 9 Vicar St., GILLES PLAINS SA 5086



## Por Ridigi Vin

### *Kredemeco.*

A: Vi estas malsaĝulo, mia sinjoro!

B: Sinjoro! mi sendos al Vi miajn atestantojn!

A: Ne bezone, sinjoro, mi kredas tion ĉi ankaŭ sen atestantoj.

### *Senkulpiĝo.*

*SinJORino, forlasante sian servantinon:* Jes, mi bedaŭras, sed mi ne povas repreni mian ateston en via serva libro pri via nepuremo. Rigardu do mem ekzemple la malpuraĵon de muŝoj tie ĉi en la angulo.



*Servantino:* Tio ĉi ja estas ne mia kulpo! tiu ĉi malpuraĵo jam estis, kiam mi antaŭ jaro komencis mian servadon ĉe Vi.

[el *La Esperantisto*, februaro 1892  
represita en *La Ondo de Esperanto*, februaro 2007]

## “The mailbox is full”

Every once in a while when I send an email — and particularly when I send out the electronic edition of *ENK*, I get back a message from the Internet provider telling me “Your message could not be delivered, because the recipient’s mailbox is full”.



This means the recipient’s mailbox at their *isp* (Internet Service Provider). You didn’t know you have such a thing?

When you start an Internet account, regardless of with which *isp*, a certain amount of megabytes is set aside on their computers by the company for your email usage, and they store copies of all your incoming email. The email being sent to your computer does not clear it from the *isp*’s computers. They allot you a lot of computer space, but it does have a limit and you need to clear it from time to time. Most email programs have in their preferences an option to empty your mailbox at the *isp* periodically. Check with your *isp* on how to do this. —  

## “La poŝtkesto estas plena”

Fojfoje, sendinte eposton — kaj precipe kiam mi dissendis la elektronikan eldonon de *ENK*, mi ricevas mesaĝon de la ret-kompanio, kiu informas min ke “Via mesaĝo ne estis liverebla, ĉar la poŝteto de la adresito estas plena.”

Tio rilatas al la poŝtkesto de la adresito ĉe ties *isp* (Provizanto de la retservo). Ĉu vi ne sciis pri ĝia ekzisto? Tio kaŭzis la problemon.

Kiam vi malfermas ret-konton, negrave per kiu retkompanio, la kompanio rezervas por vi certan kvanton da megabajtoj en siaj komputiloj por konservi kopiojn de ĉiuj epostaĵoj adresitaj al vi. Multa komputilospaco, tamen limigita. Kiam mesaĝo transsendiĝas al via komputo, ĝi tamen ankaŭ *restas* en la komputiloj ĉe la retkompanio. Necesas ke vi malplenigu la spacon ĉe la *isp* de tempo al tempo. La epostaĵaj programoj plejparte havas en siaj preferoj opcion malplenigi vian *isp*-poŝtkeston regule. Konsultu kun via *isp* por informiĝi pri kiel fari tion. —  



## Por Ridigi Vin

### *Tro granda postulo.*

- For! al sanaj kaj fortaj mi almozon ne donas.
- Kiel vi volas; pro Viaj kelkaj centimoj mi al mi piedon ne rompos.

[El *La Esperantisto* 1898 / *La Ondo de Esperanto* februaro 2007]



## • Interrete

**Aŭstria nacia biblioteko** nun enretigas sian grandegan kolekton de fotoj, inkluzive de pli ol mil priesperantaj fotoj. Iru al <http://www.bildarchivaustria.at/default.aspx> por vidi la kolekton pri la periodo 1918-1938. La kolekto temas precipe pri Aŭstrio, kompreneble. Bedaŭrinde, la priskribo de la bildoj estas nur en la germana lingvo, sed malgraŭ tio en la priskriboj vi sendube rekonos la nomojn kaj datojn de multaj el la homoj kaj eventoj.

**Podkasto:** pluraj radioelsendoj nun aŭskultebblas kiel podkasto. Inter ili estas:

- <http://www.zervic.com/chitie-nun> — Chi Tie Nun
- <http://esperan.to/podkasto/> — esPodkasto
- <http://www.radioverda.com> - — Radio Verda
- <http://www.republika.pl/viavento/aktuale/sonmaterioj.htm> — Varsovia Vento
- <http://www.rogerborges.com> - — Roger Borges
- <http://www.polskieradio.pl/eo/> — Pola Radio

**Linukso:** Post sukcesa alvoko en interreto, la nova asocio esperantista de uzantoj de Libera Programaro kaj GNU/Linukso

ne nur formale fondiĝis, sed jam establis du laborajn forumojn:

- retroŝta listo ĉe <http://groups-beta.google.com/group/eliberaprogramaro> kun 69 membroj;
  - propra nova retejo ĉe: <http://www.liberaprogramaro.net>
- Interesiĝantoj kaj kunlaborantoj daŭre estas bonvenaj. Eventualaj pliaj informoj haveblas ĉe: Felipe Castro <fecas@uol.com.br>

**Melburna Esperanta Kafo Klubo** nun havas sian propran retpaĝon. Vidu:

<http://melbourne.esperanto.org.au/>

**“Parolu, mondo”** estas nova radioprogramo dissendata de brazila radiostacio Radio Boa Nova [www.radioboanova.com.br](http://www.radioboanova.com.br).

Trovi la elsendojn estas iomete komplekse. Irinte al la supre presita URL, musumu sur la butono Off-line, elektu la vorton Domingo (“dimanĉo” en la portugala), kaj elektu la aŭdilforman ikonon ĉe la dekstra flanko de la vortoj “Fala Mundo”, en la linio 18h00 (18a horo). La esperantolingvaj programoj estas divers-temaj, klare aŭdeblaj, kaj bone kompreneblaj. Avertu, tamen: vi bezonas Broadband-on por facile



aŭskulti ĝin. Kaj ĝi estas aŭskultebla nur per Windows-komputiloj.

**Vikicitaro** estas nova sed jam impona senpaga enreta kolekto da citaĵoj ĉu esperantigitaj

el ĉiu ajn lingvo, ĉu originale Esperantaj, menciante la fonton kaj aŭtoron (se konata) kaj ligiloj al Vikipedio por plia informo. Ĝia adreso: <http://eo.wikiquote.org/wiki/Ĉefpaĝo>.

## HEJMULO KABULO

### Verkita de Kam Lee

Ĵaudon 22-an de Februaro, 2007, grupo de Esperantistoj vespere rigardis la dramon “Hejmulo Kabul” (“Homebody Kabul”), kiu estis verkita de Tony Kushner kaj prezentita en Melburno. La teatraĵo temas pri la serĉado je malaperanta anglino en Afgando. Unu el la celoj de la spektado de la verko estis vidi la aktoron Majid Shokor, kiu rolas ĉiĉeronon, kaj kies dialogo estis parte parolita en Esperanto. Resumo de la intrigo de la teatraĵo estas jena:

La unua parto de la teatraĵo okazas en 1998 kaj komenciĝas kun londona edzino, kiu parolas proksimume duonan horon pri sia entuziasmo pri la historio kaj kulturo de Afgando. Ŝi decidas iri al Kabul, pro sia obsedo, kaj ŝi malaperas el normala civilizacio.

Ŝiaj edzo kaj filino serĉas ŝin en Kabul kaj ricevas helpon de ĉiĉerono Khwaja Azis Mondanabosh (Majid Shokor), kiu estas bona Esperantisto.



*Majid Shokor*

Lia dialogo en Esperanto okazas dum du apartaj sekcioj de la dramteksto.

La unua dialogo estas demando al la filino: “Ĉu vi komprenas Esperanton?”

Bedaŭrinde, en la intrigo, la filino ne povas kompreni kion la ĉiĉerono ĵus diris.

La dua dialogo estas la deklamo de malgranda poemo, kiu mencias ĝardenon kaj bruon. La teksto estas jena:

*“Sidante en la ĝardeno, mi aŭdis bruon,*

*Vidante ŝin en la ĝardeno, mi vokis al ŝi,*

*Vokite, ŝi tuj venis,*


*La tero estis tute kovrita de neĝo,*

*Sidante, atentante, mi aŭdis*

bruon.”

La serĉo estas tre ampleksa. Ili trovas butikiston, kiu renkontis la edzinon. Ili povas kontakti ŝin, sed ili ne povas vidi ŝin persone. Je la fino de la intrigo, la edzo kaj filino informiĝas ke la edzino edziniĝis al Afgano. La patro kaj la filino helpas la eksedzinon de la Afgano iri al Anglujo.

Post la teatraĵo, mi kaj aliaj Esperantistoj renkontis Majid Shokor-on. Lia unua hejmlando estis Irako, kaj li estas ankaŭ literverkisto kaj direktisto.



*Antaŭe: Kam Lee. Starantaj (maldekstre al dekstre): Andrew Lutz, Miranda Lutz, Majid Shokor kaj Elray. Rimarku ke je la ekstrema maldekstra flanko estas pentraĵo pri bone konata komediisto Rod Quantoc.*

La esperanta dialogo por la teatraĵo estis ricevita en sonbendo, kiu estis afable farita de Steve Pitney. La helpo de Esperanto-Societo de Viktorio estis menciita en la esprimo de dankoj en la teatraĵbroŝuro.

Mi diskutis kun li ĉu uzo de la vorto “sono” estus pli bona ol uzo de la vorto “bruo”, sed ni konkludis ke ambaŭ estas taŭgaj.

La aŭtoro de la teatraĵo estas Tony Kushner, kiu estas bone konata pro sia dramo *Angels in America*, kiu ricevis Pulitzer-premion en 1993. □



## • El la regionoj

**Adelajdo:** (raportis Katja Steele)

### NI KAJ “HARMONY DAY”

La tago de harmonio (Harmony Day) estas nur kelkjara iniciato de la Aŭstralia registaro cele al paca kunvivado de sia buntdevena loĝantaro. Esperanto volas la samon, do ni kunlaboru — pensis ni en Adelajdo.

Taŭgajn kunagantojn trovis Indrani Beharry-Lall en la bibli-

oteko de Woodville North (urbo-parto de Adelajdo), kiuj disponigis al ni grandan afiŝtabulon meze de sia libro-salono.

Tie ni ekspoziciis preskaŭ dum la tuta marto informojn pri la celoj de nia movado, iom pri ĝia historio, pri literaturo, gramatiko, lernebloj. Niaj flugfolioj rajtas esti disponigataj en la ejoj de la biblioteko ankaŭ post la

forpreno de la ĉefaj propagandiloj.

Verŝajne esperantistoj en aliaj lokoj de Aŭstralio faris jam similajn ekspoziciojn. Estus interese kompari niajn spertojn. Ni mem surpriziĝis, ke ne estis simple kolekti kaj produkti prezentablajn bildojn, tekstojn. Ke tute ne abundas taŭgaj kopieblaj flugfolioj. Ke pluraj bibliotekoj senhezite rifuzas niajn iniciatojn. Ke indas flegi bonajn rilatojn kun la bibliotekistoj kaj ke ne nur Esperanta Ago-tago donas bonan kialon por videbliĝi nin.

#### MULTAJ BEZONAS HELPON

La Adelajdanoj kunvenadas du-semajne. Ni ĉiam kunportas manĝaĵojn kaj bonapetite gustumadas el ĉies poto, pleto. Post la ĉefa programero, diskutoj, anoncoj k.s. ni finas la kunestojn per gaja kantado akompanata per banĝo aŭ balalajko de nia Bobĉjo Felby.

Antaŭ kelkaj monatoj ni decidis, ke almenaŭ iomete ni provu helpi tiujn, kiuj estas ne tiom bonŝancaj kiel ni kaj do dum ĉiu kunveno ni enmetis en korbeton nedifinitan, libervolan kvanton da moneroj. Aldone ni ĉesis forĵetadi la uzitajn poŝtmarkojn kaj vendis ilin, ne multekoste, sed tamen ricevante kelkajn dolarojn, al filatelistoj. Ĝis ĉi-januaro ni tiel kolektis 300 dolarojn kiujn ni sendis al esperanta fondaĵo “Evidente” en Nederlando. Ĝi

de multaj jaroj helpas ekz. la malriĉajn ne- kaj malforte-vidantojn en Albanio kaj Rumanio, uzante la kunlaboron de la lokaj esperantistoj. Por ŝpari la sendokostojn unu el ni senkoste ĝirigis el sia uea-konto la eŭran ekvivalenton de 300 AUD rekte en la konton de la fondaĵo kaj hejme simple transprenis de nia kasiisto la aŭstralian valuton.

**NSW: *Fine de majo, Nicole Else*** ricevis la unuan diplomon en la nova programo de la Universitato de Sidnejo kiu oficiale rajtigas instrui Esperanton en la LOTE (Langages Other Than English) en aŭstraliaj lernejoj. Ŝi ankaŭ, laŭpete, prelegas al klasoj kaj grupoj en tiu Universitato. Ŝi skribas (6 junio 2007):

“Kun plezuro mi denove prelegis hodiaŭ en la “University of Sydney”. Ĉi foje mi prelegis en la klaso de D-ro Lesley Harbon al grupo de 25 estontaj lingvoinstruistoj. Mia parolado daŭris proksimume 45 minutojn. Mia prelego konsistis el parolado kaj Powerpoint-prezentado, do la studentoj spektis sur granda ekrano bildojn, ekzemple kovrilojn de diversaj Esperanto-revuoj, ktp. Ili ankaŭ spektis mallonge videobendon *Mazi en Gondolando* kaj aŭskutis kanton el la kompaktdisko *Urso-Kurso*. Mi ankaŭ respondis al kelkaj demandoj, kiel kiamaniere Esperanto povas utili dum vojaĝado.

D-ro Harbon aŭskultis kun granda intereso kaj jam esprimis intencon denove inviti min paroli venontjare al alia grupo de estontaj lingvoinstruistoj.”

**Esperanto-Federacio de Viktorio:** *Werribee Skulptajparko.* Raportas Kam Lee.

Marto 31a 2007 estis tre bela tago kaj esperantistoj iris al la Werribee-Skulptajparko, kiu lokigas 30 kilometrojn okcidente de Melburno.


La parko dividiĝis en du partojn. La unua parto estas provizora ekspoziciejo de modernaj verkoj, kiuj partoprenis en la skulptaja konkurso 2007. Kelkaj el la montrataj solidaj figuroj estas “Meniskoj” (*Meniscii*) verkita de Julia Davis, “Oscilografo” (*Oscilloscope* [trace]) verkita de Donna Marcus, “Herbaceous” verkita de Brigit Heller, “Senŝeligita mondo” (*Peeled World*) verkita de Rae Bolotin, kaj “Terra fluxus” kiu estis verkita de Craig Douglas kaj Rosalea Monacella.

“Meniscii” estas grupo de rondaj speguloj kaj iom sferaspektaj diskoj, kiuj gajnis skulptajpremion dum 2007. “Oscilografo” estis farita el ligitaj metalaj platoj kaj estas solida bildo de oscilografo. “Herbaceous” estas arego de altaj brunaj herboj faritaj el drato. “Senŝeligita mondo” estas tri metalaj skulptaĵoj kaj aspektas kiel la ŝeligita haŭto de pomo.


La dua parto estas la kons-tanta skulptaĵaro, kiu gajnis premiojn dum pasintaj skulptajkonkursoj aŭ ricevis grandan aplaudon de juĝistoj. Du el la verkoj estis “Morto de blanka varo” de Aleksander Knox, kiu gajnis la skulptajpremion en 2006, kaj “Portalo al alia tempo kaj loko” verkita de Debora Halpern 2004.




La esperantistoj rigardas de proksime la skulptaĵon “Oscilografo”, esprimo de arto laŭ scienca vidpunkto. La plej malalta skulptaĵero de la verko havas ĉ. 25 centimetrojn, kaj la plej alta ero ĉ. 3½ metrojn.



Sidanta apud unu el la skulptaĵoj “Senŝeligita mondo” Nesperioza kaj distra analizo de la mondo, ĉu ne? Malantaŭ la arto-ŝatanto (Kam Lee) estas alia el la tri skulptaĵoj en la grupo.




Alia aspekto de “Oscilograf”, kaj en la fono estas Terra fluxus (sferaj objektoj faritaj el ligno).



“Meniscii”. La skulptisto intencis flosigi ĝin en laĝeto, sed pro manko de akvo, la metalaj objektoj estis metitaj sur la teron.



“Morto de blanka varo” de Alexander Know, 2005. Portreto de aviadilruino, kapabla esprimi teruron kaj ŝokon, sed samtempe kapabla esti fokusa punkto de romantiko kiel ŝipruinoj en literaturo kaj arto.



“Portalo al aliaj tempo kaj loko” de Debra Halpen 2004. Ŝia celo estis konstrui arkon en la formo de vizaĝo kliniĝanta sur sia nazo. Iom kaprica kaj fantazia, ĉu ne? Interesaj desegnaĵoj estas sur la skulptaĵo kaj oni povas klare vidi la buŝon, orelon, kaj okulon.

[El *Viktoriaj Esperanto-Novajoj* majo 2007.] □

**Melburno:** From Carol Lutz, secretary of Melbourne Esperanta Kafo-Klubo —

Members of A.E.A. and friends of Esperanto, who find themselves in Melbourne on a Tuesday evening, can be assured of a warm welcome at Melbourne Esperanto Coffee Club.

City Library, at 253 Flinders Lane, has a group study room which is just right for our group from 6.30 till 7.45pm when we make our way to the adjacent café or, when the weather is suitable, to one of the cafes at Federation Square.

Please visit our website for

more information:  
[www.melbourne.esperanto.org.au](http://www.melbourne.esperanto.org.au)



Matthew Maguire gave an excellent talk about sign language.



Coffee time in the café (Alan, Kam, Jenny, Barrie, Carol; front row, Andy, Steve, Matthew and Andrew)



Group study room at City Library  
Skoltado Centjara 2007  
Photos courtesy of Kam Lee

## Skoltado centjara de Gwenda Sutton



Tra la mondo 28 milionoj de skoltoj nun portas tolan insignon kun la devizo “Unu Mondo

Unu Promeso” havebla in multaj lingvoj.

Baden Powell la fondinto de la skolta movado okazigis la unuan tendaron je Brownsea Island proksime al Poole en Anglio aŭguston 1907.

La centjariĝo estos observita per specialaj ĵamboreoj. Unu sur Brownsea Insulo 1-4 aŭgusto, povos partopreni nur 250 skoltoj. Krom tiuj multaj aliaj vizitos Hornsea Island por la Sunleviĝa Ceremonio. Je la unua de aŭgusto la insulo estos malfermita nur al Skoltoj kaj partoprenantoj de la Sunleviĝa Ceremonio .

Kvardek mil skoltoj, aventuristoj, skoltestroj, kun subtenantoj partoprenos la Centjariĝan Ĵamboreon je Hylands Park, Chelmsford Essex, Julio 27 – aŭgusto 8. Inter la partoprenantoj estos 170 Aŭstralianoj kaj 71 Nov-Zelandoj.

Skolta Esperanto-Ligo estis fondita en 1918. “Ĵamborea Lingvo” la brila lernolibro verkita de Ko Hammer, kaj aliajn eldonaĵojn oni povas elŝuti de

<http://www.esperanto.org/internacia/skolta/eo/eldonajxoj/Jxamborea-Lingvo/index.htm>.



Jen citaĵo el la SEL gazeto *Skolta Mondo* 2007-1. “La elstara Esperanto-verkisto William Auld ekkonis Esperanton dank’ al skoltismo en 1937. Kiel 13 jara skolto, li legis la skoltan regularon en Esperanto kaj tiamaniere eksciis pri la ekzisto de tiu lingvo.”

Miranda Lutz konsentis akcepti la rolon de SEL-reprezentanto en Aŭstralio; posteno longe vaka post la rezigno de Kep Enderby.

Miranda estis membro de ju-

naj skoltinoj (Brownie Guides) en Melburno kaj kelkaj el la tieaj knabinoj restas intimaj amikinoj. Poste Miranda estis skoltino (Girl Guide) kaj ĝuis tendumadon kaj aliajn eventojn. Kiam 15 jaraĝa, si fairiĝis skolto kiel aventuristo (“Venturer”) kaj volis akiri specialan ŝildon kiu postulis ke oni sekvu iun intereson 50 horojn. Ŝi partoprenis klasojn por lerni Esperanton kaj gajnis la altnivelan atestilon (Queens Scout Award). □

## La jaro de la hundo

de Andrew Soos kun helpo de Hazel Green



Laŭ la ĉinoj, 2006 estas la jaro de la hundo.

Oni diras ke homoj, kiuj naskiĝis en tiu jaro estos fidindaj kaj honestaj. Sed por mi, 2004 estis vere la jaro de la hundo, ĉar en tiu jaro aĉetis mi mian unuan montrahundon.

Mi estis nur juna, la unuan fojon kiam mi vidis montrahundon. En la apuda strato loĝis

homo kiu havis du belajn grandajn hundojn, de la speco Weimaraner. Kun lernejosako en mia mano, mi fiksrigardis la bestojn kun miro. Mi admiris la flekseblajn, potencajn muskolojn de la hundoj.

Sed kial la grandaj oreloj?

Ho — mi pensis — mi devos havi tian beston!

Kvankam muskola, la montrahundo ne aspektas multepeza.

Ili estas tre ludemaj, kaj povas detrui ĝardenon, kiam ili enuas.

Mi havas du hundojn: hungaran kaj germanan. La du specoj havas similan historion en la socio. La montrahundoj en Germanujo kaj Hungarujo apartenis

al la aristokratoj. Ili pasigis la plejparton de la tempo kun siaj mastroj, kaj ne estas feliĉaj kiam solaj.



La montrhundo estis bredita por ĉasado, sed la besto ne mortigu la predon. La bona montrhundo nur atendas kaj montras la predon. Pafi la predon estas la laboro de la mastro.

Kiam oni vidas la montron,

tio estas tre interesa. La hundo haltas kaj levas la antaŭan piedon. Eĉ la vosto staras, kaj estas parto de la monstro. La hundo montras per la tuta korpo de la vosto ĝis kapo kaj piedo. La monstro estas grava, ĉar la montrhundo ne estas vere ĉasisto, sed parto de la ĉasistgrupo. Mi opinias, ke pro tio la hundo estas pli afabla kaj iĝas bona famili-membro.

Mi estas bonŝanca, ke mi loĝas apud kampoj, ĉar la hundoj povus kuri 80 kilometrojn en tago.

Tio ne estas ideala por homo, kiu amas la trankvilan vivon. Por iu, kiu amas promeni kun la kompanio de du noblaj bestoj la montrhundoj estas specialaj. □

## Vinilkosmo-Novaĵoj

### VKKD R3 "Esperanto Elektronike"

"Esperanto Elektronike" estas DVD uzebla per komputilo. Ĝi estis kreita por informi pri Esperanto, por lerni kaj utiligi ĝin. En tiu ĉi DVD estas tre varia kaj abunda materialo kies celo estas malkovrigi Esperanton aŭ esti fonto de utila lernmaterialo.

Per ĝi, vi povos ricevi sperton pri Esperanto kiel kultura internacia lingvo, vivanta kaj funkcia, kiu sendube meritas apartan atenton kaj pli larĝan disvastigadon.

Informo: Vi scios kio estas Esperanto, ĝian historion, ĝian iniciatinton, ĝiajn komencon kaj evoluon.

Lernado: Esperanto-kurso ekde la unua grado ĝis profesora nivelo. Ĉiu povas trovi por si aferojn laŭ siaj intereso kaj kapablo.

Utiligado: Diversaj eblecoj por uzi la lingvon: spekti filmojn, aŭs-



kulti muzikon, legi librojn kaj revuojn, fari ludojn, ktp.

Tiu ĉi DVD estis preparita de la E @ I-teamo — junulara internacia organizo prizorganta diversajn projektojn rilatantajn al Edukado @ Interreto, kaj kies ĉefaj celoj estas iniciati kaj instigi al interkultura studado, kaj subteni la utiligon kaj studadon de interreto kaj lingvoj.

Kunlaboris al tiu projekto trideko da personoj, dekduo da asocioj kaj organizoj (inter alie EUROKKA kaj Vinilkosmo), 23 verkistoj kaj 28 artistoj esperantistaj, kaj esperantaj muzikbandoj.

Notindas ke la enhavo estas en 28 diversaj lingvoj!

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi:

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkdr3&lng=e>

### Radio Pola

La ĉesigo de la funkciado de la Esperanto-Redakcio de Radio Polonia kaj elsendado de ĝiaj programoj pere de mallongaj ondoj, satelito, kaj WRN, afiktis tre multajn aŭskultantojn. Sed ja ĉiuj esperantistoj daŭre povas aŭskulti kaj elŝuti la novformulajn podkastajn Esperantoprogramojn de Pola Radio pere de la paĝoj:

<http://www.polskieradio.pl/eo/> kaj <http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml>

Vi ankaŭ povas aŭskulti ĉiulunde parton de la programo dediĉitan al muziko, ekzemple tiun de lundo la 26a de februaro prezentis la albumon de Martin & la Talpoj “Pli ol nenio” kun fragmentoj de kelkaj titoloj.

Krom la nombro de vizitoj sur la paĝoj kaj la nombro de abonoj de la podkastaj programoj, daŭre gravas la korespondaj kontaktoj kun la redakcio.

La adreso samas:

<esperanto@polskieradio.pl>

Laŭ sama adreso vi povas sendi viajn fotojn pri via esperantista aktivado por riĉigi la fotogalerion. Sed ilin devas akompani via konsento prezenti ilin publike sur la paĝo de la programo.

### Vinilkosmo en Myspace

Paĝaro speciale gastiganta muzikproduktaĵojn, videojn, kaj aliajn iniciatojn de sendependaj artistoj, [www.myspace.com](http://www.myspace.com) fariĝas varba poluso por nia esperanta muziko. Vinilkosmo kaj la Studio de la Trappe havas nun ankaŭ tie siajn paĝojn!

<http://www.myspace.com/vinilkosmo>

<http://www.myspace.com/studiodelatrappe>

Kaj dum ni parolas pri artaj iniciatoj, necesas informi pri “novaĵo” en la rubriko “video” ĉe Vinilkosmo.com, “Ska virino” de la praa bando Esperanto-Desperado!

Festo 2007 — Esperanto muzike ĉi-somere!

FESTO, organizata de JEFO kaj EUROKKA, okazos en Montoire-sur-le-Loir de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto 2007. Estos *La* muzika festivalo de la somero!

Denove la teamo de FESTO surpiedigis bonegan muzikan programon kun steluloj kiaj Martin & la Talpoj, ex-Persone (roko); JOMO kaj la Liberecanoj (punkfolko orienta); Kore (roko melodia); kaj la estontaj steluloj kiaj La Pafklik (repo en Esperanto!), Tifen(folko), kaj Melono (ĵazo), Nigra Flago (punko).

Sed la kulmino de la festivalo estos Zhou-Mack kaj La Fabo, esperanta regea bando kiu kantos premiere antaŭ Esperanto-publiko. Kompreneble FESTO proponos aliajn programerojn, ludojn, kinon, ekskursojn, prelegojn, diskotekon, ktp.

Montoire-sur-le-Loir estas facile atingebla, situanta je proksimume 100 km okcidente de Orléans. Por pliaj informoj kaj aliĝoj antaŭ ol ne plu restos loko:

<http://www.myspace.com/festo> 2007 <http://festo.esperanto-jeunes.org>

### Dennis Rock Tamba:

Post longega kaj arda laboro, finfine Dennis Rock Tamba prezentas sian unuan videon sur KD sub titolo “Libera” realigita de la konga nacia televido. Li registris tiun videon kun la muzikgrupo Masikulu Abba Afrika, kreita de André Mbongo.

André ludas gitaron, Seya afrikan tamburon, Matsuda kantas kun Dennis Rock laŭ natura kaj simpla ritmo la titolojn “Libera”, “Mi amas vin”, “Edzin”. La lasta titolo de la video, “Savu la naturon”, prezentas bildojn de Kinshasa. La video estas memproduktita kaj eblas ĝin mendi rekte de Dennis Rock Tamba: <denistamba@yahoo.de> □



## Por Ridigi Vin

### *El la jar-raporto*

Tamen, en la prtaktiko, estas foje malfacile distingi la agadon de la fakaj asocioj... (Estrara Raporto // Esperanto, 2006, N°6, pĝ. 126)

[El *La Ondo de Esperanto* februaro 2007]



# • For the Beginner

## by Donald Broadribb

“After he came...”

“Veninte...”

One place where new speakers and writers tend to slip up is to forget that Esperanto has many nuances that we lack in English.

How often have I read, even in the writings of experienced writers, such style as “*Post kiam li renkontis ilin, li invitis ilin iri kun li al la kinejo*” (“After he met them, he invited them to go to the movies with him.”)

The best way to express this in Esperanto would be: “*Renkontinte ilin, li invitis ilin akompani lin al la kinejo*”. Esperanto has a rich selection of verb forms, and it is a pity not to use them when they are appropriate.

The *-inte* form is particularly handy for when we want to say something like “after doing...”, “after saying...”, “after seeing...” and the like.

“After” and “Before”

Sometimes you may find “*Post ol...*”, the result of a confusion with the phrase “*antaŭ ol...*”. Logically, I suppose, since *antaŭ* means “before” and *post* means “after”, and we are taught

to say *antaŭ ol veni* for “before coming”, we assume that “after coming” should be *post ol veni*. But this is not the case. “After coming” is *post veni* (with no *ol*), but more simply *veninte*. This is the traditional usage.

Names of countries

Some people insist on their particular preferences, when popular usage allows more than one way of expressing yourself. One of the traditional bugbears of this sort is whether names of countries should be made using *-io* or *-ujo*. For example, should we write and say “Francio” or “Francujo” as the Esperanto name of France?

Just as in English, the Esperanto names of countries are rather chaotic, and this is very likely to remain the case for centuries to come, just as it has been for well over 100 years now in Esperanto.

The word *ujo* means “a container”, and it early acquired a number of metaphorical uses. *Monujo* meant a coin purse, *pomujo* an apple tree, and *Francujo* meant France. Many people still use *ujo* in this way, although *pomarbo* seems a more obvious word for apple tree, and

competes with *pomujo* in popularity.

But the major problem comes with such a word as *Francujo*. In French, the name of the country is “France”, in Spanish it is “Francia”, in German it is “Frankreich”. It would be logical to call it *Franclando* in Esperanto, and some people do. After all, *Finnlando* is Finland, and *Ruslando* is a popular name for Russia.

However, from early on it also became popular to use the name *Francio* for France, *Germanio* for Germany, *Rusio* for Russia, *Aŭstrio* for Austria, and so on.

Then something odd happened: between the two world wars, the anti-nationalist organization *Sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT) became one of the most popular Esperanto groups, and — for reasons no longer clear — it decreed that *ujo* must not be used for country names, we must always use names that end with *-io*. As we might expect, Esperantists who did not agree with the anti-national view of SAT then tended to associate such names as *Francio* with the ideology of SAT, and a most peculiar ideological language war began and became pretty intense.

After the Second World War the ideological conflict over *-io* ended almost as quickly as it

had begun. Gradually *Francio* came to compete with *Francujo* in popularity, and eventually the ending *-io* came to be about equally popular with the use of *ujo* in the names of countries.

Of course, many national names have no special ending at all: *Aŭstralio*, despite its appearance, does not consist of *Aŭstral* + *io* but is all one single term. *Usono*, *Kanado*, *Brazilo*, *Kanado*, and the other names of the countries in the Americas, have no special composition, they are all complete names in and of themselves.

In Europe, *Liĥtenŝtejno*, *San-Marino*, *Monako*, *Vatikano*, are complete names in themselves, as are *Kongo*, *Sud-Afriko*, *Zimbabvo*, *Mozambiko*, *Morako*, *Angolo*, and others are also complete names in themselves, as are also *Liberio*, *Alĝerio*, *Tanzanio*, *Malio*, and others, in which the *io* is part of the basic spelling and unrelated to the *-io/ujo* concern.

Some people have tried to use *io* to mean “country” in all national names, and occasionally such forms as *Kanadio*, *Meksikio*, *Brazilio*, and such turn up. But it seems foolish to invent such names when there are already well established Esperanto names for them. In the case of *Brazilio* (Portuguese: *Brasilia*), this is the name of the capital city of Brazil. The capital

city of Mexico is *Meksikurbo* (in Spanish: Ciudad México). [The capital city of Canada is *Otavo*, in English: *Ottawa*.]

What about *Koreo*, *Vjetnamo*, *Afganistano* and many other names? Many people prefer to call those countries *Koreio*, *Vjetnamio*, *Afganio*. The name of India has become dubious in recent years, because many people prefer to call it *Barato*, instead of the traditional *Hindio* or *Hindujo*.

There is no easy answer to give in this morass of confusion. In *ĜK* we generally leave it to our authors to decide for themselves whether they prefer to speak of *Francio* or *Francujo*, *Anglio* or *Anglujo*. But with *Koreo*, *Vjetnamo*, *Hindio*, *Meksiko*, *Brazilo*, we prefer to keep to the traditional spellings. This is purely an editorial decision.

We can console ourselves with one thing, in any event: the events of the past sixty years or so have caused so many changes in the names of countries, in all languages, that we can pretty confidently expect the chaos for many centuries to come.

### Plua/Plia

Esperanto distinguishes the basic words *pli* (more, larger quantity) and *plu* (further, longer). For example: *mi ne pli vidis* (“I didn’t see anything more”) and *mi ne plu vidis* (“I no

longer saw”). The *pli* refers to quantity: “How much did I see? I did not see anything else.” The *plu* refers to time: “How long did I see it? I did not see it any more.”

English speakers tend to confuse the two Esperanto words, because we often use the word “further” for both meanings. This is also true of some other languages, such as French (*plus*) and Spanish (*mas*).

Often the distinction is difficult to make. In theory, we should say: *Mi marŝis du horojn, sed mi ne povis pli marŝi* = “I walked for two hours, but I could not walk any more [I was all tired out]”. And this should be distinguished from: *Mi marŝis du horojn, sed mi ne povis plu marŝi* = “I walked for two hours, but I could not walk any further [a barrier prevented me from going beyond that point].” Most people tend to say “...mi ne povis *plu* marŝi” in both instances, and if there is any ambiguity, they would specify: *ĉar mi estis tro laca* (“because I was too tired”), or *ĉar mi renkontis barilon* (“because I came to a barrier”). Logic probably has to give way to custom, here, and we have to accept both expressions as valid.

“Do you want to eat another fig?” — Which do we say, *Ĉu vi volas manĝi plian figon?*, or *Ĉu vi volas manĝi pluan figon?* Log-

ic says that it should be “plian”, but in practice most Esperanto speakers say “pluan”. Just where logic leaves off and traditional usage takes over is a very

difficult question. Again, probably we do best to accept both expressions as equally valid, the one because of logic, the other because of being customary.



## La Universitato Shenyang starigas novan rekordon Raportis Wu Guojiang, vicprezidanto de LEA

La jaro 2007 estas la Esperanto-instrua jaro de Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA) en Ĉinio. La Universitato Shenyang aktive reagis al tiu ĉi iniciato. La 1-an de marto, 2007, la unua tago de la nova semestro, 600 studentoj eniris en kvar Esperanto-kursojn funkciigitajn de la universitato kaj ĝis nun [18 aprilo] neniu forlasis tiun ĉi nedevigan studobjekton.

Tiu nombro estas la plej alta en la nunaj universitatoj, kiuj enkondukas Esperanton en la provinco kaj vere estas nova rekordo. La studentoj akiros 2 studpoentojn se ili sukcese trapasos ekzamenon. La lernolibro adoptita estas “Esperanto—Kurso de La Nova Jarcento!”, kompilita de Prof. Liu Zhengkun kaj Prof. Song Yunsheng.

[El *ret-info*] □

.....

## Konkurso “Esperanto kunligas nin” Ĉinio invitas al konkurso

La 26-an de julio 2007 estos la 120-a datreveno de la naskiĝo de Esperanto. Omaĝe al ĝi ni lanĉos la rubrikon “Esperanto kunligas nin” en nia TTT-ejo kaj sincere petas viajn kontribuojn.

La kontribuajo povas esti en ajnaj stilo kaj formo, temante pri Esperanto-aktivo, pri viaj kontakto kun ĉinaj samideanoj, vojaĝo en Ĉinio, impreso pri Ĉinio kaj pri EPĈ...

Estos tre bonvenaj fotoj pri

diversaj aktivadoj kaj portreto de la aŭtoro. Premioj estos aljuĝitaj, kaj la gajnintoj ricevos Esperanto-librojn aŭ paperan “Espero.com.cn”, kaj ĉiu kontribuanto ricevos donaceton.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn antaŭ la 31-a de julio 2007.

Adreso: El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037, Pekino, Ĉinio;

Retpoŝtoj: <elpc@china.com>, <bluacxielo@163.com> □

### Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la septembro-oktobra numero: 5a de aŭgusto 2007

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco  
P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio  
[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)



### La Aŭstralia Esperanto-Asocio

143 Lawson St • Redfern NSW 2016 • Aŭstralio  
<http://www.esperanto.org.au/>

*Prezidanto:* **Igor Couto** | [prezidanto@esperanto.org.au](mailto:prezidanto@esperanto.org.au)

*Sekretario:* **Miranda Lutz** | [sekretario@esperanto.org.au](mailto:sekretario@esperanto.org.au)

*Kasisto:* **Stephen Pitney** | [kasisto@esperanto.org.au](mailto:kasisto@esperanto.org.au)

*Membreco:* \$40 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$25. Asocia membreco: \$10.

*Pagu al Libroservo de AEA* | [libroservo@esperanto.org.au](mailto:libroservo@esperanto.org.au)



### La Novzelanda Esperanto-Asocio

P.O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Novzelando  
<http://www.esperanto.org.nz/>

*Prezidanto:* **David Ryan** | <http://www.ryangomez@xtra.co.nz/>

*Kasisto:* | **Don Rogers** | [don-cles@ihug.co.nz](mailto:don-cles@ihug.co.nz)

*Sekretario:* **Bradley McDonald** | [bradley.m@xtra.co.nz](mailto:bradley.m@xtra.co.nz)

**Membreco:** \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo  
(<20-jara: Klubo: \$1 por ĉiu ano

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.  
Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

# LA SUDA KRUCO

Julio-Aŭgusto 2007

if undeliverable return reply paid to  
D. Broadribb • P.O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

POSTAGE  
PAID  
AUSTRALIA

PRINT POST  
PP631048/0005